
# LA UNUA SERIA MURDISTO DE LA (PRA)HISTORIO




TERESA SOLANA

Tradukis

JAVIER GUERRERO

# TERESA SOLANA

# LA UNUA SERIA MURDISTO DE LA (PRA)HISTORIO

**Traduko de Javier Guerrero**

¡Hjckrrh!

**Barcelono, 2013**

Originala titolo: *El primer assassí en sèrie de la (pre)història*

Kovrildezajno: JauJa
Kovrildesegno: Marc Valls
Bitenpaĝigo: JauJa
Provlegantoj: Víctor Solé, Alfons Tur kaj István Ertl
© Teresa Solana, 2010
Eldono 1.0 kiel bitlibro: novembro 2013
© traduko en Esperanton: Javier Guerrero
© ¡Hjckrrh!
http://hjckrrh.org
ISBN-13: 978-84-941502-4-1

Ĉiuj rajtoj rezervataj.
Permesoj: info@hjckrrh.org

## Pri tiu ĉi verko

Teresa Solana (Barcelono, 1962) publikigis ĝis nun la romanojn *Un crim imperfecte* [Malperfekta krimo], *Drecera al paradís* [Ŝparvojo al la paradizo], *Negres tempestes* [Nigraj ŝtormegoj] kaj *L'hora zen* [La zena horo], tradukitajn ankaŭ en la hispanan, la anglan, la francan, la germanan kaj la italan. Ĉiujn verkojn oni povas priskribi kiel krimliteraturon, sed plenplenan de humuro kaj socian kritikon. En la du unuaj kaj la lasta libroj ĉefrolas la ĝemeloj Eduard kaj Borja, ne tiom lertaj detektivoj el Barcelono.

Solana ankaŭ aperigis la rakontaron *Sis casos de sang i fetge i una història d'amor* [Ses sangegaj aferoj kaj unu am-novelo], kie legeblas «El primer assassí en sèrie de la (pre)història», la teksto ĉi tie esperantigita.

La kataluna leganto de tiu rakonto stumblas sur pluraj nomoj de ĉefroluloj de la kataluna historio. La nomoj de la troglodito j eĥas la saman familiecon por la esperantaj legantoj kaj mi esperas, ke ankaŭ la humuro de la aŭtorino bone translokiĝis en ĉi tiun eldonon.

Mi ege dankas al Teresa Solana por afable cedi siajn aŭtorrajtojn kaj tiamaniere ebligi la esperantan eldonon de sia verko. Pri la esperanta versio mi dankas la provlegantojn de nia eta rondo familia en Barcelono, Viktoro kaj Alfons, kaj al István Ertl.

*La tradukinto*

# La unua seria murdisto de la (pra)historio

*Por Alejandro*

Frumatene, kiam ekfulmotondris, kelkaj el ni vekiĝis kaj malkovris alian kadavron ene de la groto. Ĉi-foje temis pri Kolomano. Vidante la frakasitan kranion kaj la cerebelon flosantan tra la tempioj meze de flako de nigra sango, mi iomete kapturniĝis, sed la viroj vangofrapis min kaj baldaŭ mi refortiĝis. Tuj ni iris veki nian estron, por ke li ĵetu rigardon kaj proponu agad-indikojn, sed, ĉar Ludoviko iomete misaŭdas kaj li dormis kiel urso vintre, malgraŭ la kriaĵoj de la viroj, finfine ni devis pisi sur lin por lin vigligi. Nia estro, grumblante kaj okulmuke ankoraŭ, studis la kadavron de Kolomano kaj dume ĝisoste malbenis nin ĉar ni ellitigis lin tiel mishore. Intertempe, la pluvo ĉesis kaj la suno leviĝis.

Dum Ludoviko kaj la aliaj divenadis kio okazis, mi rimarkis la sangmakulitan ŝtonon, kiu restis je malmultaj metroj de la korpo de Kolomano kaj sugestis al Ludoviko, ke eble la du faktoj interrilatas. Ludoviko, malparolema troglodito, rigardis min skeptike kaj konsilis al mi ne tro haste alveni al konkludoj.

–Paŝon post paŝo –li diris–. Unue, mi volas matenmanĝi.

Vorinte strutovan omleton kaj testud-stufaĵon postrestintan de la hieraŭa vespermanĝo, Ludoviko trankviligis la virojn kaj certigis, ke temas pri akcidento. Tuj poste, purigante sian dentaron per branĉeto, li esprimis sian deziron paroli kun mi private. Li kaj mi kaŝe englitis en angulon de la groto celante, ke la ceteraj maskloj ne aŭdu nian konversacion, sed,

ĉar la groto, kie ni loĝas havas bonegan akustikon kaj al Ludoviko oni devas alparoli kriante, ĉar li misaŭdas, ĉiuj sciiĝis pri kio ni interparolis. Fakte, mi ne scias la kialon de tiom da sekreteco, ĉar li mem tuj kunvokis asembleon por informi la virojn kaj, krom Louisde, kiu estas klaĉema kiel pordistino, neniu multe priinteresiĝis.

Ludoviko, kiu malgraŭ ĉio ne estas tiel stulta, kiel li ŝajnas, petis al mi malfermi enketon, ĉar tri mortintoj dum dekkvar lunperiodoj estas multaj mortintoj kaj nia familia rondo eknervoziĝas. La fakto, ke ĉiuj tri estis maskloj kaj ke ni trovis ilin frumatene kun la kapo disrompita per ŝtono estas tro por esti hazardo, malgraŭ ke li kaj Louisde ŝajnigas sin prudentaj kaj obstinas en la akcident-hipotezo. Miaflanke, mi preskaŭ certas, ke en tiu ĉi groto io okazas. La problemo estas, ke mi ne scias kio.

Louisde, kiu estas la dekstra mano de Ludoviko, tuj kontraŭstaris la ideon, ke mi estru la enketon, sed Ludoviko tujtuje vangofrapis lin tiel forte, ke li elŝiris paron da dentoj el ties buŝo kaj la diskuto estingiĝis. Nu, iel logikas, ke nia tribestro elektis min por okupiĝi pri la afero, ĉar mi estas la plej lerta troglodito el ĉiuj. El la dudeko da maskloj kiuj anas en la klano de la Harabunda Urso (je unu masklo pli aŭ malpli), mi estas la nura kiu ne stumblas ĉiumatene sur la sama ŝtono elirante la groton, kaj ĉiuj miras pri tio. Alia favorpunkto: mi estas la troglodito kun plej multe da libertempo, ĉar Ludoviko strikte malpermesas al mi ĉasadi kun la viroj. Parte, ĉar multe lerta en tiu agado mi ne estas kaj li preferas, ke mi restu kun la virinoj anstataŭ ĝeni la ĉasistojn, kaj parte, ĉar, eĉ kontraŭvole, li agnoskas miajn intelektajn kapablojn kaj la utilecon de miaj elpensaĵoj. Fakte, se mi tuthazarde ne malkovrintus la fajron dum printempa vespero, kiam la aliaj maskloj sekskovris la inojn kaj mi enuis kiel kakto, plej probable mi jam de tempo estus forpelita de la groto kaj kuŝus subtere en la nekropolo aŭ en la ventro de iu besto. Finfine, pensi per la kapo kaj ne per la piedoj (aŭ per tiu parto, kiun ni ĉiuj konas) alportas avantaĝojn. Iam ili ekkomprenos. Mi je tio fidas.

Tiel do, la privilegia statuso de senfarulo, kiun mi ĝuas ene de la tribo, ne lasis al mi alian eblecon ol akcepti la komision de Ludoviko. Li estras kaj ni povas grumbli laŭvole, sed tio ne estas demokratio. Profitante, ke ĉesis pluvi, la viroj eliris ĉasadi mamutojn kaj la virinoj serĉi helikojn, kaj intertempe mi kuŝiĝis sub figarbo kaj funkciigis miajn grizajn ĉelojn por serĉi spuron, kiu helpu al mi malkovri la identecon de la murdisto. Nu, Ludoviko kaj Louisde diras tion, kion ili volas, sed mi estas konvinkita, ke ĉi tie okazas io suspektinda kaj ke ni estas antaŭ tri murdoj kristalklaraj kiel akvo de l' rivero.

La unua elmondiĝinta estis Teodoro. Ankaŭ li aperis kun la kapo frakasita apud sangmakulita ŝtono. Ĉar Teodoro estis bona ulo, sed stultis kiel ŝtipo, ni ĉiuj pensis, ke li mem estis la sola respondeculo kaj ni fermis la diskuton. Post kelkaj lunperiodoj, alvenis la vico de Vilmoso, kaj, ĉar Vilmoso estis frapita ĉefe je la dekstra parto de la cerbo, mi eksuspektis, ke io ne iris glate. En la klano ĉiuj scias, ke Vilmoso estis maldekstrulo (ĉefe ĉar lia dekstra brako finiĝis en la ventro de iu besteto), tiel do, malfacile povus temi pri sinmortigo aŭ akcidento, la teorio de ni konsiderita en la okazo de Teodoro. Miaj suspektoj konfirmiĝis ĉi-matene, kiam ni trovis la kadavron de Kolomano. Unuarigarde, la kialo de la morto ŝajnis la sama, sed, ĉar ĉi tie neniu scipovas plenumi nekropsion dece, ni ne povas esti plencertaj. Manke de sciencaj pruvoj, mi devas eniri terenon de hipotezoj, kaj tio estas glita tereno, kie facilas fali vizaĝalteren. Malgraŭ ĉio, mi pensas ke estas tri faktoj, kiujn mi povas certigi klare kaj rekte kaj tre difinite: unue, la tri homoj forpasis pro perforta morto; due, iu platigis iliajn kraniojn per ŝtono; trie, tio okazis dum ili dormis, ĉar ĉiuj tri estis trovitaj sur la amaso de putrantaj folioj, kiun ni nomas lito.

Mi ne volas melodramigi, sed, ne forgesante, ke la *modus operandi* ŝajnas la sama en la tri kazoj, mi jam emas pensi, ke ni alfrontas la unuan serian murdiston de la prahistorio. Ĉar la ulo, kiu faris tion, jam likvidis tri virojn kaj ni ankoraŭ ne malkovris lin, mi deduktas, ke temas pri masklo malvarma, kalkulema kaj inteligentega.

Matenmeze, la viroj revenis el la ĉasado portante paron da mamutoj. Ĉi-foje ne estis homperdoj. Mi, petinte aprobon al Ludoviko, decidis ekigi la pridemandadojn kaj parolis kun ĉiuj tribanoj por malkovri ĉu iu malhavas alibion. Bedaŭrinde, ĉiuj havas la sian, ĉar ĉiuj ĵuris kaj reĵuris, ke tiam ili dormis ene de la groto. Tial, ke mi pasigis la nokton en la tombejo pripensante la neelteneblan leĝeron de la homa estaĵo, mi komprenis, ke mi estas la nura viro sen solida alibio. Sed mi ĵurus, ke mi ne mortigis Kolomanon. Pri tio mi preskaŭ certas.

Ni ĉiuj havas alibion, do, mi pensis, ke eble mi estis serĉanta misloke. Ne for de nia groto, staras vilaĝeto de domoj konstruitaj el ŝtonoj, kiun ni nomas Domaro. Ĉar tio ĝi estas, aro da domoj. Eblas, do, ke la murdisto ne anas en nia tribo, sed venis el ekstere. Se la murdisto estas fremdulo, la domaranoj estus la ĉefaj suspektuloj, ĉar, laŭ nia scio, tiu de la domaranoj estas la nura komunumo de prahistoriuloj, kiu ekzistas proksime de ni. Informite pri miaj cerbumadoj, nia estro Ludoviko decidis sendi delegitaron por provi klarigi la faktojn.

Al Domaro iris Ludoviko, Louisde, Teofilo kaj mi mem. Unue, ni maltrankviliĝis, ĉar ili praktikas la kanibalismon (la en-kanibalismon, ili klarigas) kaj ni timis, ke ili forvoros nin antaŭ ol ni sukcesos komprenigi la celon de nia vizito. Finfine, la afero ne disvolviĝis tiel danĝere. La neandertaluloj el Domaro estas tre gastamaj kaj ili regalis nin per unuaklasa bonveno. Eĉ invitis nin al banado en varma akvo ene de kuirpoto plena de legometoj kaj spic-herboj, iomete kiel rita sinlavado, sed ni, ĉar akvo por ni ne estas santaĵo, ĝentile rifuzis la banon, argumentante, ke nia kredo malpermesas lavi nin, kaj ni eklaboris. Post la tipa interŝanĝo de donacoj –rondan ŝtonon kontraŭ alia ovala, trilobiton kontraŭ amonito–, ni klarigis al Kabeo, ilia estro, kio okazis en la groto kaj niajn suspektojn. Li estis nerebatebla.

–Sed, kiel vi povas pensi, ke la murdisto eliris el Domaro? Vi ja diras, ke neniu formanĝis la kadavrojn kaj ni estas kanibaloj! –li plendis kolerege.

–Nu, vi ĉiam diras, ke vi praktikas la en-kanibalismon, tio estas, ke vi manĝas unu la alian nur ene de via propra rondo –mi kontraŭdiris.

–Bone, pli malpli –konfesis Kabeo iomete kontraŭvole–. Sed ni posedas pli kompleksajn ilojn kaj ni ne iras tra la mondo mortigante homojn perŝtone kiel vi faras. Ho mia kor', se estus unu el la niaj, li estus uzinta hakilon kaj ne ŝtonegon!

–Vi pravas –mi devis konfesi.

–Ve, ni iru –diris Ludoviko, leviĝante rapide–. Ĉio evidentas nun. Kabeo, ni ne pluĝenos vin. Kaj pardonu, ke ni tedis vin per niaj elpensaĵoj. Kelkaj –li aldonis malaprobe rigardante min– pensas sin iaj fi-*Sapiens sapiens*...

–Ne zorgu –diris Kabeo kompreneme–. Stultuloj abundas kiel fungoj post pluvo.

Ni revojis silente kaj kiel batitaj hundoj. Alveninte la groton, mi ricevis bruan skoldadon kaj vangofrapon, kiun mi malsukcesis eviti. Ludoviko kaj Louisde, kiuj estis tre ĉagrenitaj, kriadis al mi antaŭ la virinoj.

–Ni fariĝis rid-objektoj –riproĉis al mi Louisde–. Mi ne scias por kiu merdo utilas al vi posedi tiel evoluintan cerbon se vi trafas neniam.

–Erari estas home –mi diris, rimorsplene.

–Do, Johano Martino, ne estu tiel homa kaj eklaboru! Kaj inventu jam la hakilon, ve! –aldonis Ludoviko–. Ni ŝajnis kruduloj tie.

–Ne zorgu, morgaŭ mi komencos la laboron –mi certigis.

Foriginte la teorion de fremda murdisto, mi decidis koncentriĝi al la loĝantoj de la groto, ĉar, se la domaranoj estas senkulpaj, la kulpulo devas vivi inter ni. Cerbuminte iom da tempo, dum mi atendis, ke la virinoj alportu la kolazionon, mi pensis, ke eble utilus klopodi malkovri kio kunigas la tri viktimojn, t. e., Teodoron, Vilmoson kaj Kolomanon, kaj mi alvenis al la jenaj konkludoj: a) la tri homoj estis maskloj, b) la tri estis ĉasistoj, kaj c) neniu el la tri estis senmortulo. Krom tio, mi pensis pri nenio alia. Mi ne kapablis malkovri iun ajn motivon ankaŭ pro tio ke la tri forpasintoj estis tre belaj homoj. Nu, nur laŭkaraktere.

Post la kolaziono, dum mi pretiĝis por fari alian siesteton, mi pensis, ke indus fari psikologian profilon de la murdisto por vidi, ĉu tiamaniere mi sukcesus forigi kelkajn suspektulojn. La rezulto iomete seniluziigis min, ĉar la nura konkludo al kiu mi alvenis estas, ke la kulpulo scipovas uzi ŝtonon. Mi povas neglekti, do, la suĉbebojn kaj Julion, ĉar li ne havas brakojn de kiam urso formanĝis ilin dum li siestis sonĝe sub pomarbo, ĉe la groto. Krom la tri viroj jam forpasintaj, restas proksimume kvindek tri gesuspektuloj, pro tio ke mi ne volas formeti la virinojn aŭ ili farus scenon kaj akuzus min je masklismo. Kvindek tri gesuspektuloj estas multaj gesuspektuloj, sed tio preferindas ol nenio.

Ĉiel, tiun ĉi liston oni devas mallongigi. Mi revenis sur miaj paŝoj kaj memoris, ke mi starigis sur netuŝebla fundamento, ke la murdisto devis esti ulo malvarma, kalkulema kaj inteligenta. Tiu ĉi lasta ero kondukis min forigi aŭtomate, pro evidentaj kialoj, la virinojn kaj la infanojn. Mi repensis la liston de maskloj de nia tribo kaj, por paroli rekte, mi ne kapablis trovi eĉ unu al kiu mi povus apliki la a-vorton «inteligenta». Ankoraŭfoje la suspektoj perfingre montras al la kulpulo: mi ne nur malhavas alibion, sed ankaŭ estas la nura neandertalulo en la grupo, kies neŭronoj funkcias. Cetere, mi estas frostema kaj la nura homo, kiu scipovas kalkuli –kun erar-marĝeno prudente malgranda–, kiom da maskloj restas en la tribo kiam forpasas tri. Mi kolektis mian kuraĝon kaj decidis akcepti la evidentaĵon: sendube, mi estas la murdisto.

–Mi solvis la aferon –mi anoncis al Ludoviko, kiu estis dispartiganta unu el la mamutoj–. Ekzameninte la faktojn, mi alvenis al la konkludo, ke mi estas la kulpulo.

–Kion vi celas? –demandis Ludoviko, flankenlasante la mamuton kaj rigardante ŝokita al mi.

–Post elimino de la neeblaĵoj, kio ajn restas, kiom ajn malprobabla, devas esti la vero –mi verdiktis–. Ludoviko, la murdisto estas mi.

–Johano Martino, ne diru sensencaĵojn –kriis Ludoviko, pugnobatante ŝtonon kaj frakasante unu aŭ du ostetojn de sia mano–. Kiel damne vi povas esti la murdisto? Vi eĉ falas teren nur vidante iomete da sango!

–Vi pravas. Mi forgesis pri tio.

–Do, skuu vin! Se vi ne solvas la aferon antaŭ ol mallumiĝos, ĉi-nokte neniu povos fermi la okulojn kaj ni devos buĉoferi vin, tion vi jam scias.

–Ne, mi tion ne sciis.

–Nu, ĉar mi elpensis tion antaŭ nelonge. Ni voĉdonis kaj la viroj aprobis la proponon. Pardonu, mi forgesis komenti tion al vi.

–Ne gravas.

* * *

Mi havas la impreson, ke mi malbone alproksimiĝas al tiu ĉi enketo. De la unua momento mi koncentriĝis pri *kiu*, kaj eble mi devas celi pri *kial* kaj la respondo venos de si mem. Kial oni mortigis ĝuste Teodoron, Vilmoson kaj Kolomanon? Kiu kialo kaŝiĝas malantaŭ tiuj mortoj? Kiu profitas de tio?

Estas afero pri kiu Louisde atentigis kaj eble indas je konsidero. Ĉiuj maskloj en la tribo estas maltrankvilaj pri la murdoj. Tamen, la virinoj restas trankvilegaj, kvazaŭ la afero pri la seria murdisto ne tuŝus ilin. Eĉ Klara, la matriarko de la klano, ŝajnas tute ne zorganta pro la fakto, ke ni havas kapfrakasan psikopaton ĉirkaŭ la groto. Kaj tio pensigis min. Kion mi ne vidas? Kion mi ne kapablas kapti?

Ĉiuj scias, ke virinoj posedas sekreton, tiun pri kiel ili faras idojn. Ĉu ili kaŝe manĝas ian magian radikon, kiun ni ne konas? Ĉu ili ne ellasas furzojn kaj pro tio la ventro tiom ŝveliĝas, ke finfine kreskas ene infaneto? Ĉiuj maskloj obsediĝas pri la afero de la naskado, ĉar kiom ajn ni bravulaĉas kiam ni eliras festumi dum la semajnfino, prave ili tenas ĉiujn fadenojn en siaj manoj. Se la maskloj malkovrus la sekretojn de inoj por naskigi, la povo, kiun ili posedas super ni, malaperus. Jen «aranĝu la groton», jen «vi pisis sur misan arbon», jen «la viando estis malmola»... Ili traktas nin kiel pupetojn kaj –kun la ekskuzo, ke ili devas mamnutri la infanetojn– devigas nin elĵeti la rubon kaj ĉasi bestojn, pro kio ni ofte revenas al la groto kun unu kama-

rado aŭ unu ekstremaĵo malpli. Sed ne eblas kompreni, kiel ili faras tion, la maliculinoj.

Ĝuste la hieraŭon de kiam oni frakasis lian kapon, Teodoro anoncis, ke li malkovris la grandan sekreton de la virinoj: la inoj gravediĝas danke al nia blanka pisaĵo. Kompreneble, tio estas stultaĵo, kaj krom Vilmoso kaj Kolomano, kiuj estas tre kredemaj, neniu el ni prenis serioze tiun klarigon. Ĉar se la blanka pisaĵo de la viroj estus la kialo, pro kiu la virinoj gravediĝas..., ankaŭ la kaprinoj kaj la kokinoj, kiuj estas en nia korto, naskus infanojn! Kiom stultaj ili estis!

Malgraŭ, ke mi ne kredas, ke la sekreto de la virinoj iel rilatas kun la murdoj, mi decidis iomete priparoli kun Klara, ĉar ĉio entute fiodoras al mi. Mi eldiris al ŝi miajn dubojn kaj ŝi tuj trankviligis min.

–Johano Martino, kredu al mi, ne enmiksiĝu.

–Nu, ŝajne vi virinoj ne timas havi psikopaton ene de la groto. Kaj tio minimume estas iomete stranga...

–Ĉu hazarde ankaŭ vi volas aperi iun matenon kun la kapo frakasita? –diris ŝi prenante ŝtonon.

–Virino, ne... Sed se mi ne trovas la kulpulon, morgaŭ oni buĉoferos min frumatene. Vi jam konas la karakteron de Ludoviko...

–Do, sidiĝu kaj aŭskultu atente al mi –ŝi diris, kaj vespiris–. Tio estas, kion vi diros morgaŭ al Ludoviko kaj al tiu ĉi aro da kruduloj.

Ĉar Klara estas ege kuraĝa kaj kapablas sendi plenkreskan masklon al la alia ekstremo de la groto per vangofrapo, mi sidiĝis obeeme apud ŝi kaj aŭskultis ŝiajn klarigojn kaj argumentojn. Konsiderante kiom traflerta ŝi estas ĉasante vespertojn perŝtone, ŝiaj argumentoj tuj konvinkis min. Poste, mi iris al Ludoviko por anonci al li duafoje, ke mi solvis la aferon.

–Teodoro, Vilmoso kaj Kolomano estis punitaj de la dioj ĉar ili ŝovis la nazon en aferon, kion ili ne rajtis koni –mi anoncis fiere.

–Kiun aferon? –demandis Ludoviko seninterese.

–La sekreton de la virinoj. Tion pri la infanoj...

–Ah! –Ludoviko gratis siajn pli sentivajn partojn kaj saltigis paron da puloj–. Kaj kiuj estas tiuj dioj pri kiuj vi parolas?

–La dioj estas superaj estaĵoj, kiuj regas la universon –mi diris, improvizante–. Ili estas eternaj, ĉiopovaj kaj senmortaj. De la ĉielo, kie ili loĝas, ili vidas ĉion kaj ĉion scias.

–Kaj kiel vi scias tion? –demandis li fiŝvizaĝe.

–Mi spertis ensonĝan vizion. Mi estis informita, ke se ni ne plu penos scii, kiel faras virinoj por naski idojn ne estos pli da mortoj.

–Tio estas bona novaĵo! –diris Ludoviko mortigante plian pulon–. Afero fermita! Kaj nun ni iru vespermanĝi. Mi tiel malsatas, ke mi formanĝus diplodokon! –Kaj li aldonis ridetante kaj signante per la nura okulo kiu restas al li–: Se ili ne estus formortintaj, kompreneble...

Ne estas malbona tago. Hodiaŭ mi solvis tri murdaferojn kaj inventis karambolserie la antaŭdiraĵojn, la diojn kaj la sonĝinterpretadon. Kaj, nerekte, mi savis mian haŭton. La nura afero, kiu nervozigas min estas, ke ekde nun ĉiuj ĝenados min, por ke mi interpretu iliajn sonĝojn. Kaj ili eĉ volos, ke mi faru tion senpage. Mi jam antaŭvidas tion. Hmmm, «mi havas erotikajn sonĝojn kun mia patrino kaj sonĝas, ke mi mortigas ajnulon». Hmmm, «hieraŭ mi sonĝis, ke la menhiro de tiu alia ajnulo estas pli longa ol la mia...» Mi ne scias, eble mi devus proponi al mi elpensi la psikanalizon. Fakte, ĝuste nun mi havas nenion pli bonan por fari.